

kultura  
revuo  
de hejs

n-ro

1

la

malamo

## LINIOJ DE la mano

"la mano" celas esti kultura revuo, ĉefe por junaj hispaniaj esperantistoj, kiuj ne ku timas legi alilandajn periodaĵojn (ĉu pro mo no? ĉu pro nescio, apatio, ignoro?). Laŭplane ĝi eldoniĝos du fojojn en ĉiu jaro. Ĉar kultu ra, ĝi aperigos ĉian materialon: originalan, tradukan, tutnovan aŭ senhonte represan, bele tran aŭ politikan, ktp... Do, ne sunozu ĝin kohera. Nek tro pretenda. Ĝspereble ni reren kontiĝos en dua numero.

gk

### ALVOKO

Se vi estas HEJSano, kial diable vi an koraŭ ne sendis viajn kunlaboraĵojn por "la mano"? Antaŭdankon.

Se vi ne estas membro de HEJS kaj, tamen, vi ricevis tiun ĉi numeron de "la mano", ĝi ja estas invito kunlabori. Sendu al la redakta adreso (prespretajn aŭ ne) tradu kojn, desegnaĵojn, fotojn, artikolojn, poemojn, rakontojn, eĉ nemenditajn recenzojn - ne nur pri libroj, ankaŭ pri filmoj - ktp... Kontribuontoj, kies tekstoj publikiĝos, ricevos pluajn numerojn.

Ilustras ĉi numeron  
ses desegnoj far Raquel Gaspar.

# El «Mastro de l' ringoj»

LA KUNULARO DE LA RINGO

kiu estas la unua parto de

MASTRO DE L' RINGOJ

de

J.R.R. TOLKIEN

PROLOGO

1

pri Hobitoj

Tiu ĉi libro pri-traktas plejparte hobitojn, kaj per ĝiaj paĝoj la leganto povas eltrovi multon pri ties karaktero kaj iom pri ties historio. Pliajn informojn oni trovas en tiu

elektaĵo el la Ruĝa Libro de Okcidentlino, jam publikigita sub titolo La Hobito. Tiu rakonto deriviĝis el la komencaj ĉapitroj de la Ruĝa Libro, verkitaĵ de Bilbo Men, la unua Hobito famiĝinta en la mondo ĝenerale, kaj de li titolitaĵ Tien kaj Keen, tial ke ili priskribis lian vojaĝon en la Orienton kaj revene: aventuro, kiu poste implikis ĉiujn Hobitojn en la grandaj okazaĵoj de tiu Epoko ĉi tie priskribataj.

Multaj tamen volos ekde la komenco scii pli pri tiu rimarkinda popolo, kaj iuj eventuala ne posedas la pli fruan libron. Por tiaj legantoj, estas jen kolektitaĵ el tradicioj de l' Hobitoj kelkaj notoj pri pli gravaj punktoj, kaj la unua aventuro estas mallonge revokita.

La Hobitoj estas popolo maltrudiĝema sed tre malnova, pli multnombra antaŭe ol hodiaŭ; ĉar ili anas pacon kaj

trankvilon kaj bonan kultivitan grundon; bonorda terkulturaĵo estas ilia ŝatata frekventejo. Ili nek komprenas nek komprenis aŭ ŝatis maŝinojn pli komplikaĵajn ol forĝilaĵo, akvomuelilo, aŭ mana teksilo, kvankam ili uzis lerte laborilojn. Ĝis en la malnovaj tagoj ili kutime kondukis singarde pri "La Granduloj", kiel ili nomas nin, kaj nuntempe ili evitas kun konsterniĝo nin kaj iĝas malfacile renkonteblaj. Ili bonege aŭdas kaj estas akravidaĵoj, kaj kvankam ili estas dikiĝemaj kaj ne rapidas nenecese, ili tamen moviĝas elaste kaj lerte. Ili posedis ekde la komenco kapablon malaperi senprokraste kaj silenti, kiam krude preterpasis granduloj, kiujn ili ne voĉis renkonti; kaj tiun kapablon ili jam evoluigis ĝis al la domoj ĝi edie ŝajnas magia. Sed la Hobitoj fakte neniam studis ian ajn magion, kaj ilia fuĝivo rezultiĝas sole el lerto profesieca, kiun heredo kaj ekzercado, kaj proksima malproksima al la tero, igis neimitebla de rasoj pli grandaj kaj pli mallertaj.

Ĉar ili estas po-

polo etstatura, pli mallongaj ol nanoj: malpli dikventraj kaj solidaj, nome, eĉ kiam efektive ne multe pli malaltaj. Ilia alteco varias, inter sesdek kaj cent dudek centimetroj laŭ nia mezurado. Malalte jam ili ĝiskreskas unu metron; sed ili ŝrumpis, ili diras, kaj en la malnovaj tagoj estis pli altstaturaj. Laŭ la kuŝa Libro, bandobroo ĵuk (bovblekulo), ilio de Isengrimo dua, altis cent kvardek centimetrojn kaj kapablis rajdi ĉevalon. Lin superis laŭ ĉiuj hobitaj arkivoj nur du famuloj de la malnova tempo; sed tiu kuriozaĵo estas en tiu ĉi libro traktota.

Kiom koncernas la hobitojn de la provinco, pri kiuj temas ĉi tiuj rakontoj, dum 1<sup>a</sup> epoko de siaj paco kaj prospero ili estis popolo gaja. Ili vestis sin nekolore, preterante precipe flavon kaj verdon; sed malalte portis ŝuojn, ĉar iliaj piedoj havas tortikajan ledecajn plantojn kaj estis kovritaj de densa blukia hararo tre simila al iliaj kapharoj, kiuj ĝenerale brunis. Iel la sola metio mal multe praktikita inter ili estis la

. Ŝularado; sed longajn lertajn fingrojn ili havis kaj povis fabriki multajn aliajn aĵojn utilajn kaj belaspektajn. Pli ofte ol belaj, iliaj vizaĝoj estis ĝenerale bonhumoraj, larĝaj, brilokulaj, ruĝvangaĵaj, kun buŝoj inklinaĵaj al ridoj, kaj al manĝado kaj trinkado. Kaj ili ja ridis, kaj manĝis, kaj trinkis, ofte kaj entuziasme, ĉar ĉiam plaĉis al ili senkomplikaj ŝercoj, kaj ses manĝoj ĉiutage (kiam tiuj haveblis). Ili estis gastamaj kaj tre ĝuis festojn, kaj donacojn, kiujn ili malavare disponigis kaj volontege akceptis.

Estas ja tre klare, ke malgraŭ postaj trendiĝoj, la Hobitoj estas niaj parencoj: pli proksimaj al ni ol Elfoj, aŭ eĉ nanoj. En la mainovaj tagoj ili parolis sianmaniere la lingvojn de la homoj, kaj ŝatis aŭ malŝatis proksimume la samajn aferojn kiel la homoj. Sed kia precize estas nia parenceco, tio ne plu estas malkaŝebla. La komenciĝo de la Hobitoj troviĝas tre malproksime en la Antikva Epoko jam perdita kaj forgesita.

Ankoraŭ konservas arĥivojn pri tiu malaperinta epoko nur la Elfoj, kaj ties tradicioj koncerniĝas preskaŭ tute pri ilia propra historio, en kiu aperas malofte la homoj, kaj la Hobitoj tute ne estas menciitaj. Iamen estas evidente, ke la Hobitoj efektive vivis kviete en Mez-Tero dum multaj longaj jaroj antaŭ ol aliuloj konsciis pri ili. Kaj pro tio, ke tinfine la mondo plenplenas je nealkuleble multaj strangaj kreitoj, tiuj etuloj ŝajnis relative malgravaĵaj. Sed en la epoko de Biŭbo kaj ties heredanto Frodo, ili subite, kontraŭ sia volo, graviĝis kaj konatiĝis, kaj ĝenis la interkonsiliĝojn de la Saĝuloj kaj la Eminentuloj.

Jam delonge forpasis tiuj tagoj, la Tria Epoko de Meza-Tero, kaj la konturoj de ĉiuj landoj ŝanĝiĝis; sed la regionoj, en kiuj tiam loĝis la Hobitoj, estis sendube tiuj samaj, en kiuj ili plu restadas: la Nord-Okcidento de la Mainova Mondo, oriente de l' Maro. Pri sia origina

hejmo la Hobitoj en la epoko de bilbo konservis nenlun scion. Anu ai kiereco (escepte de geneologio) estis inter ili ne tre oita, sed ankoraŭ restis kelkaj en la pli mainovaj familioj, kiuj studis la proprajn librojn, kaj eĉ kolektis de Elfoj, Nanoj kaj Homoj raportojn pri antaŭaj epokoj kaj malproksimaj landoj. Iliaj propraj analoj komenciĝis nur post enloĝiĝo en la Provinco, kaj iliaj plej antikvaj legendoj ririgardis apenaŭ pli malproksimen ol ĝis iliaj tagoj vagabondaj. Estas tamen evidente, per tiuj legendoj kaj per la atestaĵo de iliaj strangetaj vortoj kaj kutimoj, ke samkiel multaj aliaj popoloj la Hobitoj dum la malproksima pasinteco translokiĝis okcidenten. Iliaj plej fruaj historioj ŝajnas ekvidigi epokon, am kiu ili loĝadis la pli altajn valojn de Anduino, inter la randaĵoj de l' Verd-baro Granda kaj la Nebulecaj Montoj. Kial ili poste entreprenis la malfacilegan kaj danĝerplenan transiron de l' montoj en Eriadoron, tio ne plu estas certa.

Iliaj propraj analoj mencias multobliĝon de homoj en la lando, kaj ombro, kiu kovris la arbaron, tiei ke ĝi malnelliĝis kaj ĝia nova nomo estis Morbarbaro.

Antaŭ la transiro de l' montoj la Hobitoj jam dividiĝis en tri ion malsimilajn rasojn: harfutoj, Sturoj kaj Falohidoj. La Harfutoj estis pli brunhaŭtaj, pli malgrandaj, kaj pli malaltaj, kaj ili estis senbarbaj kaj senbotaj; iliaj manoj kaj piedoj estis netaj kaj lertmovaj; kaj ili preteris altejojn kaj montueklivojn. La Sturoj estis pli larĝstaturaj, pli pezkorpaj; iliaj piedoj kaj manoj estis pli grandaj, kaj ili preteris platejojn kaj riverbordojn. La Falohidoj havis pli blondajn haŭton kaj hararon, kaj ili estis ankaŭ pli altaj kaj pli maldikaj ol la aliaj; ili amis arbojn kaj boskojn.

La Harfutoj en la mainovaj epokoj havis multajn kontaktojn kun la Nanoj, kaj longe loĝadis la antaŭdeklivojn de la montoj. Ili frue translokiĝis okcidenten kaj vagis trans Eriadoron ĝis Veterverto dua la

aliaj troviĝis ankoraŭ en Sovaĵujo. Ili estis la plej normala kaj reprezenta speco de Hobito, kaj proporciege la plej multnombra. Pli ol aliaj ili enis restadi en unu loko, kaj plej longe konservis sian praktikmon loĝi en tuneloj kaj truoj.

La Sturoj restadis longe sur la bordoj de la Riverego Anduino, kaj malpli evitis la Homojn. Ili okcidentiris post la Harutoj kaj sekvis la fluon suden de la Bruakvo; kaj tiel multaj el ili longe loĝadis inter larbado kaj la lilaĵoj de Dunlando, antaŭ ol translokiĝi norden denove.

La Falohidoj, la malplej multnombraj, estis norda branĉo. Ili pli ol la aliaj hobitoj amikiĝis kun Elfoj, kaj pli lertis pri lingvo kaj kantado ol pri metilaboro; kaj pratempe ili preferis ĉasadis ol pluzadis. Ili transiris la montojn norde de Riven-delo kaj laŭiris la kiveron Prujnelon. En Eriadoro ili baldaŭ intermiksiĝis kun la aliaj specoj pli true alvenintaj, sed pro tio, ke ili estis iom pli bravaj

kaj pli aventuremaj, ili ofte troviĝis kiel eminentuloj aŭ ĉefoj en klanoj de Harutoj aŭ Sturoj. Eĉ dum la epoko de Bilbo ankoraŭ rimarkeblis forta falohida heredeco inter la pli eminentaj familioj, kiel la Tjukoj kaj la Mastroj de Boklando.

En la okcidenta regiono de Eriadoro, inter la Nebulecaj Montoj kaj la Montoj de Ljuno, la Hobitoj trovis kaj Homojn kaj Elfojn. Efektive, ankoraŭ loĝis tie restaĵoj el la Dunedanoj, reĝoj de la Homoj venintaj trans la maron el Okcidentio; sed ili estis rapide malmultiĝantaj kaj la tero de ilia Norda Reĝlando larĝe dezertiĝadis. Troviĝis pli ol sufiĉe da loko por enmigrantoj, kaj postnelonge la Hobitoj komencis enloĝiĝi en ordaj komunumoj. Plejparte iliaj fruaj loĝlokoj jam delonge malaperis kaj forgesiĝis je la epoko de Bilbo; sed unu, kiu tre true graviĝis, plu ekzistis, kvankam reduktita laŭ amplekso; tiu troviĝis ĉe Brio kaj en la ĉirkaŭa fietarbaro, proksimume sesdek kilometrojn oriente de la

Provinco.

Estis dum tiuj iruaj tagoj, sendube, ke la hobitoj lernis sian abocan kaj komencis skribi laŭ la maniero de l' lunedanoj, kiuj siavice, antaŭ tre longe, lernis tiun arton de la Eifoj. Kaj same en tiu tempo ili forgesis la lingvojn, kiaj ajn ili estis, pli frue uzitajn, kaj ĉian poste parolis la Lingvon

Komunan, Okcidentaĵon kiel oni nomis ĝin, aktualan en ĉiuj reĝlandoj de Arnoro ĝis Gondoro, kaj laŭlonge de ĉiuj bordoj de l' Maro ekde Bellalaso ĝis Ljimo. Iamen ili retenis plurajn vortojn proprajn, kiel ankaŭ la proprajn nomojn de monatoj kaj tagoj, kaj granda amaso da personaj nomoj el la pasintenco.

Elanĝligis William Auld

---

tutmonde esperantista ĵurnala organizo



**tejo-**

**TUTMONDE**

oficiale gazeto de tejo dumonate

---

**ABONU "TEJO-TUTMONDE"**

---

*Oficiala gazeto de TEJO*

*Informas - anoncas*

*Raportas - rakontas*

*Opinias - kritikis*

*Kuraĝas - kuraĝigas*

*Instigas - edukas*

*TT evoluis al unu el  
la plej bonaj gazetoj  
en esperantujo. Tial  
TT abonindas por 15 NLG  
al la CO de UEA.*



## Sentitola penso

Si dormas akroĉita al sia fenestro, dorse al aliaj homoj, kaj tiel malofte ŝia lampo luniĝas la antikvan ĉambron, ke mi facile povus kalkuli kiomfoje dum la lastaj sep jaroj kaj memori ĉiun fojon kvazaŭ pretekston por sendorneco, kvazaŭ pravligon antaŭ ŝi mem.

Si atendas en ombro, kiel strizo, kaj evitas tiun lumon, kiu blindigas dum traserĉo en la nigro; ŝi atendas kaj la horoj iamas el ties ebonaj horloĝoj, tiel forte belaj, el ties malgranda kolekto da vekhorloĝoj, el ties ora horloĝo ĉepojna.

Kaj tiel pokaj la aŭtoj, ke jam de malproksime ŝi rekonas la motorbruon, kaj pro la tonvarioj, la aniastaton de la stiranto, kaj pro la tuso alkohola, tian plej nunan timon.

Si apertas la pordon malofte, eble ĉar ne multaj homoj onin vizitas - ĉar la anikoj vizitas, tiel raraj, kaj la malamikoj, ĉiamaj kaj lojalaj, kaj la scivolemaj oĝulinoj, kiuj ne kutimas aŭ ne volas eniĝi en

prohibitan frukton.

Eble ŝi lasas la pordon iernita dum preskaŭ la tuta jaro ĉar ŝi ne bezonas manĝi kaj sufiĉas al ŝi vidaĝon de tiu fenestro, kiu baldaŭ falos, tiel foruzita kaj flavaĉa. Fenestro, de kie ŝi suferas prizonon de la kolomboj, kiujn fiulo enkarcerigis; prizono ekstera, ĉar la kolomboj ne plu scias kien iri, al kutimiĝintaj al la kolombejo, samkiel ŝi al kutimiĝis al la fenestro.

Eble tiu maljuna korpo, kiu tagon post tago perdas pezon, lasas la okulojn apertaj nur pro kutimo. Aŭ eble ĉar la vermoj, kiujn ŝi ne toleris en la tombejo, jam atingis ŝian bruston kaj tiklas senpaŭze, kaj ne permesas ŝin dormi, kaj igas ŝin eterne sendorma... sep jarojn jam, ĵuste ekde kiam ni akroĉis ŝin al la fenestro... Eble jam estas tempo iri ŝin serĉi, morgaŭ estos ŝia festotago.

Verkis: José Valén

Tradukis: Antonio Valén

## Esperantaj vortoj kaj hispanaj vortoj

Antaŭ du jaroj, sprita esperantisto diris en la argona klubo "Fraterco", ke eble Zamenhof estus elpensinta la hispanan lingvon anstataŭ Esperanton, se li estus daŭriginta siajn projektojn pri Internacia Lingvo post 1887, ĉar tiuj sinsekvaj projektoj ĉiufoje pli kaj pli similis la hispanan.

Eble optimisma troigo, ĉi tiu anekdoto ne restas nura spritaĵo, ĉar kvankam Zamenhof ne parolis la hispanan (li konis naŭ lingvojn: latina, hebrea, jida, angla, rusa, pola, franca, germana kaj Esperanta), li esperantigis multajn latinajn vortojn kiel rezultatoj "hispanaj".

Dum mia unua IJK en Krakovo, multaj homoj min demandis, ĉu veras, ke Esperanto similas la hispanan. Mi tuj respondis ĉias jene: "Jes, sed same kiel ĝi similas la portugalan, provençalan, katalunan aŭ italan. Estas simpla koincido". Eble tia respondo ŝuldiĝas al tio, ke mi ĵus legis dumkongrese "Esprimu de sentoj en Esperanto" kaj krome, mi plurloke legis, ke oni ne devas senpripense kaj stulte aserti, ke via nacia lingvo estas la plej parenca al Esperanto.

Ĉio ĉi instigis min serĉi vortojn absolute samajn en ambaŭ lingvoj pro luda decidiĝo tute persona. Mi ne scias -almenaŭ pri la hispana- ĉu temas pri "jam ludata ludo".

Por ĉi tiu artikolo, mi celis trovi cent vortojn skribe kaj prononce identajn en Esperanto kaj en la hispana. Mi ne enkalkulis vortojn skribe samajn sed ne prononce (neologismo, vino) aŭ prononce samajn sed ne skribe (asterisko, flor', monoteismo).

En la centvorta listo troviĝas hispanismoj rekte aŭ nerekte esperantigitaj (albino, fandango, silo).

Mi trovis ja pli ol cent vortojn identajn (ekz.: limbo, determinismo, tono) kaj eble vi, leganto, konas multajn aliajn, ĉar la luda vortlimo estas pli ol centalta.

Meniu rigardu ĉi tiun artikolon kiel pruvon de parenceco inter la hispana kaj la esperanta lingvoj. Mi konscias, ke Esperanto pli similas etimologie la francan aŭ la italan, kaj prononce la polan aŭ la serbokroatan. Tamen, mi insistu: Zamenhof ne parolis la hispanan, do ĉi tiu listo estas kroma pruvo -kvankam nenecesa- pri la internacieco de Esperanto.

Jen de la centvorta listo. Ĉiuj vortoj troviĝas en PIV kaj en URAE. (Averto kontraŭkritikebla: La vortoj estas principe hispanaj).

abismo	fariseo	parlamento
aeroplano	feminismo	pedagogo
albino	feto	periplo
alfabeto	formato	pino
alta	foto	plano
analfabeto	fragmento	pleonasmo
anapesto	friso	profunda
antagonismo	fundamento	progreso
antisemitismo	futuro	pulso
antropomorfismo	grado	saldo
aparato	gramo	salto
apetito	grupo	sana
arbusto	gusto	sedimento
argumento	instrumento	sermento
asfalto	lago	nirno
astigmatismo	leopardo	silo
atributo	libido	sola
bardo	libro	suplemento
bastardo	ligamento	talento
biplano	lino	teatro
busto	litro	templo
butano	metro	testamento
daltonismo	minuto	tipo
densa	modelo	tirano
destino	momento	torpedo
dinamo	monoplano	terco
dorso	mulato	tributo
dura	muro	trofeo
elemento	negro	trono
empirismo	negro	tropo
erudito	orgasmo	tumulto
eterna	oro	turismo
fandango	salafito	uro

Ĉu nur 99 vortoj? Kio troviĝas la centaj? Ĝuste vi devas ĉin en viaj gantoj!

Antonio Valón

## LITERATURA MANIFESTO '87

Ni, esperantistoj, festas la signifan daton de la cent-jara jubileo de Esperanto. Kaj fakte temas pri evento vere celebrinda, ĉar ja io mirakla pulsas en la lingvo, se konsideri, ke de la momento mem de sia naskiĝo ĝi sukcese kapeis tra detruaj ŝtormoj kaj ĉio-renversaj uraganoj. Estas plej miriga kaj paradoksa fenomeno, ke ĉi ŝtormoj kaj uraganoj koviĝis ankaŭ en la esperantistaj medioj, t.e. en la sino de Movado, kiu levas la standardon de Esperanto kiel signon de interhoma paco kaj de universala frateco.

Ke Esperanto tamen ne splitiĝis en mil pecojn pro la negativa kaj miopa laboro de multaj esperantistoj, ŝuldiĝas unua-loke al la genia antaŭvido de Zamenhof. Li rigardis la literaturon baza premiso por la disvolvo de la lingvo kaj per siaj verkoj originalaj kaj tradukaj donis al ĝi la necesan koheron. La cent-jara tradicio beletra de Esperanto konstituas la rokon kontraŭ kies granitan mason frakasiĝis sinsekvaj generacioj de reformuloj de la sintakso, de la morfologio, de la ortografio kaj eĉ de la baza strukturo de la lingvo.

Cent jarojn post la naskiĝo de Esperanto, la ĝenerala situacio de la Movado esence prezentas la saman panoramon kiel en la fruaj tempoj. Nun, kiel tiam, la ekstera mondo plu ignoras nin aŭ maksimume nin rigardas sektanoj iomete folaj kaj iomete ridindaj. Nun, kiel tiam, oni proklamas denove la samajn argumentojn, jam mil-foje ripetitajn, por la totala esperantigo de propraj nomoj, por la ignoro de la gramatika karaktero de la radikoj, por la ŝanĝo de la aspekta verbo-sistemo al la tempa interpreto kaj por la enkonduko de alfabeto sen diakritaj signoj.

Aliflanke, kiel reeĥo de la pratempa Esperanto, eĉ eminentaj esperantistoj plu tamtamas, ke pro la senfine vorto-krea kapablo de la afiksa mekanismo, la enkonduko de neologismoj estas nociva balasto por la lingvo, kvankam tion klare dementas la fina rezulto de multaj originaloj kaj tradukoj en Esperanto. Ĉi kulto al rudimenta lingvo tuj trovas favoran eĥon, ĉar tiaj esperantistoj flatas la intiman deziron de granda parto de la verda popolo, kiu volas uzi la lingvon nur kiel plaĉan hobion aŭ kiel simplan ludilon, montrante tiel kuriozan trajton de intelekta dikotomio pro tio, ke ili sentas nul ĝenon antaŭ la pompo

kaj pleto de siaj propraj naciaj lingvoj kaj aŭtoroj, nek antaŭ la senĉesa plimultiĝo de neologismoj en naci-lingvaj vortaroj, sed energie reagas kontraŭ la provoj doti Esperanton per tiom da esprim-eblecoj, kiom ĝi bezonas por konkurenci sur sama nivelo kun la naciaj lingvoj.

Lasta-tempe kelkaj famaj aŭtoroj, iam kreintoj de ne pokaj neologismoj, nekonsekvence printas siajn voĉojn al la floro de partianoj de la hobia Esperanto. Tiel agis Baghy en la tridekaj jaroj, kiam li solidariĝis kun la amaso de eternaj komencantoj por bojkoti la tiutempe novan, kaj renovigan, lingvon de la genia Kaloscay.

Ĉar la kritikoj de la nunaj anatemantoj direktiĝas ĉefe kontraŭ la aŭtoroj originalaj kaj tradukaj, en poezio aŭ en prozo, kies plej signifaj verkoj publikiĝis/as ĉe la eldonejo Iltis, necesas prezenti la principojn de la membroj kaj simpatiantoj de la t.n. Iltisa Skolo rilate la esperantan beletron kaj rilate la lingvon ĝenerale.

- 1 La Iltisa Skolo fidelas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto.
- 2 La Iltisa Skolo inspiriĝas rekte en la artismo de la Budapeŝta Skolo kaj ĉefe de ties korifeo Kálmán Kaloscay.
- 3 La Iltisa Skolo konscias, ke nia beletro, kaj nia lingvo entute, bezonas por sia plua evoluo kaj nuanca riĉiĝo daŭran enkondukon de neologismoj kaj de parolturnoj por familiaraj, vulgaraj kaj slangaj esprimoj. La Iltisa Skolo daŭrigas tiel la tradicion riĉigi la lingvon laŭ la ekzemploj kaj la konsiloj de Zamenhof kaj de niaj plej brilaj aŭtoroj.
- 4 La Iltisa Skolo laboras por progresemaĵoj kaj legantoj kaj atendas, ke ĝiaj kontraŭuloj konduku rilate al Esperanto kiel rilate al la propraj naciaj lingvoj, t.e., ke ili ne pretendu influi sur literaturon, kiun ili ne favoras, kaj legu nur tion, kio plaĉas al iliaj lingvaj kaj estetikaj preferoj.
- 5 La Iltisa Skolo strebas uzi lingvon ĉiam pli riĉan, pli suplan, pli elvokivan, pli naturan, pli kapablan redoni al la tradukoj la tutan

vivon kaj freŝon de la nacilingvaj tekstoj, kaj laboras kun la intenco fari ĝin multe pli taŭga kaj adaptebla al la originala verkado en Esperanto.

La Itisa Skolo aspiras ĉefe esprimi sin plej klare, koncize kaj simple en la formo, eĉ se okaze la temoj ne prezentigas facilaj kaj simplaj. Ankaŭ la slava spirito de Esperanto pledas por stilo simpla, klara kaj konciza, kiel eminente montras la traduka genio de K. Bein (Kabe).

- 6 La Itisa Skolo ne povas preni serioze la protestojn de kelkaj aŭtoroj kontraŭ novaj vortoj, ĉar ili mem uzas ne pokajn neologismojn en kruda kontraŭdiro al siaj konfesataj konvinkoj. aŭ koncedas, ke oni uzu neologismojn, sed prudente kaj en etaj dozoj, kvankam ili neniam determinas, kiom la prudento permesas, kaj kiom devas esti la etaj dozoj.

---

Kiel responsaj esperantistoj kaj aŭtoroj, la Itis-skolanoj, gvidataj ankaŭ de sia artisma sento, tre bone konscias, ke la lingvo, pro sia specifa naturo, ne toleras troan akcelon evoluon sen risko de skismiĝo.

La Itisa Skolo turnas sin al esperantistoj, kiuj favoras ĝian pozicion, kaj invitas ilin subskribi ĉi Manifeston kaj kunaktivi kontraŭ la rutino, la inercio kaj la involuciaj tendencoj forte manifestigantaj, ankoraŭ en la cent-jara dat-reveno de Esperanto, en multaj verkoj originalaj kaj tradukitaj kaj en la kritikaj taskoj de kelkaj recenzistoj.

Sarlanda Esperanto-Ligo  
Schulstr. 30

D-6601 Scheidt

## LETEROJ


Kara Georgo,

(...) Unue, (...) vi kompromitiĝe erarus subskribanta la Literaturan Manifeston haŭpentalan. Ja, oni povas konsenti kun pluraj eroj de ĝi, sed la tuta emfazo estas malsane mislokita. Tiu ridinda quddado pri neologismoj, pli ĝenerala pri formo super enhavo, ŝajnas al mi bona ekzemplo de tiu "hobinco" kiu Literatura Manifesto '87 pretendas kontraŭbatali. Tiu t.n. skolo karakteriziĝas unuvice per malestima, fakte aroganta elitisma sinteno al la esperantista komunumo, t.n. la homoj kiuj fakte vivigas Esperanton kaj apartigas ĝin de ĉiu alia iama planlingva projekto. Ke oni plu kapablas trakti Esperanton kiel ludilon, kiel iun intelektan puzlon evoluigoblan sendepende de ĝiaj parolantoj, estas tenomano rekte kontraŭa al ĉiu sana literaturo krebla en tiu lingvo. (Ja, okej, mi asertas "La litomiŝla tombejo", sed tiu romano funkcias nur ĉir la tempo estas tia izolita esperantisto, ne iu normale komunumo aŭ socio.) Oni devas unuvice verki per homoj, per komuniki, ne per montri ke oni estas pli inteligenta, pli rafinita aŭ kulturita ol onia legantaro. Tial mi reĵetas ĉiujn intelektajn pretendojn de la haŭpentalanoj, al kiuj nur Piĉ montris ke li kapablas produkti iun grandan artverkon.

Se mi verkus Literaturan Manifeston, mi dirus preskaŭ nenion pri formo krom emfazi la bezonon de komunikado kun la leganto, ĉu temas pri tradukoj, ĉu pri originaloj. Gusta formo estas tiu kiu harmonias kun la enhavo de la verko, kiu plifaciligas/plifortigas tiun komunikadon. Sed mia manifesto temus ĉefe pri tiu enhavo, pri la eblaj temoj en Esperanto, pri la bezonoj de la movado kiu parolas tiun lingvon. En tio mi trovis samideanon en Mauro Nervi, kiu sendis mallochan anonon por la Jubileo Numero kiu tre trafe, el alia angulo, prilumas la saman temon. Kaj mi ne vidas ke vi, (...), povus senti vin komforta inter tiuj elitistoj kiam la justuloj staras ĉe alia flanko!

Verŝajne mi troigis, sed estas bone povi troigi de temp' al tempo.  
(...)

Mark Fettes



## La sonorilo de Van Willem

La mateno estas friska en Roterdamo, malgraŭ la fakto, ke ni trapasas la mezon de aŭgusto. Milda, agraba venteto flugas kiel papilio, jen tien, jen alien. Ptolema, ŝi buklas la toliplenajn arbobranĉojn, sin suprenparas kaj atingas la pinton, la plej supran pinton de la preĝejo Van Willem, kiun la nazioj en la Dua Mondmilito bombardis kaj parte detruis. Sed la venteto, tiel alten sin jetinta, kompreneble ne havas la necesan forton por skui la bronzan sonorilegon, kiu tie pendas. Ne pli ol ete karesas ĝin, kaj pluigas sian sencelan sed ĉarman vojaĝon.

Iam alia sonorilo pendadis samloke de la tempo, kiam la hispanoj okupadis Nederlando. Jam dekomence tiu bruna aĵo ne estis plej bonfama, kion efektive pravigis la postaj faktoj. Unuafoje okazis, ke ŝi per si mem eksonis, kiam la hispanoj, ne longe sieĝintaj la urbon,

provis nokte konkerti ĝin. La roterdamanoj, avertitaj de la subitaj noktaj sonoj, vekis... kaj tamen ne sukcesis defendi sian urbon.

Ĝi estis la plej okultrapa kaj surpriza trajto de la sonorilo. Ĝi eksonis ne por averti pri malliĉo kaj ebligi, ke oni ĝin evitu, sed... ŝajnas, ke ŝi eksonis kondolence, eĉ se temis pri iom tro frua kondolenco.

Unuafoje ŝiaj timovekaj blekoj ekaŭdigis sin re en nokto, la 16an de junio 1923. Policistoj, proksime-loĝantoj, baldaŭ la tuta Roterdamo estis vekita, kaj apenaŭ restis tempo por demandi, kio okazos, kiam el Eŭropordo, la enfluejo de la havenego de Roterdamo, venis la novaĵo, ke unu el la digoj, cetere el la laŭlame plej fortikaj, disrompiĝis pro la turioza atako de la ondegoj de la Norda Maro, kaj granda parto de la tero, sur kiu sidis dek vilaĝoj kaj du urboj, unu el ili



hajo, estas inundita. La ĝisnuna plej granda katastrofismo, kiun pro digrompliĝo Nederlando devis affronti en sia historio. Pereis centoj da homoj, se ne miloj, kompare kun kio la enormaj materiaj perdoj estis sensignifaj. Sed super ĉiuj (t.e. super ĉiuj, kiuj ne perdis karan personon ĉe la inundo) precipe ŝvebis penso pri la mistera sonorilo, kiu, kiel antaŭvideble, iuj eknomis demona. La preĝestro, kutime tre iera kaj kontenta pri sia preĝejo, subite montriĝis absolute nesciema kaj same timema, kiel multaj aliaj. Fideletoj iom post iom ĉesis viziti en normalaj tagoj la preĝejon, poste ankaŭ dimanĉe, ĝis fine nur najbaraj maljunuloj, kiujn ties malsamo aŭ malforto eldevigis ne iri tro malproksimen, ĝin vizitadis ne tre volonte. La polico kutime tajias pri tiaj aferoj, ĝis ili fariĝas socia cirkonstanco, kaj tiam ĝi ne plu povas permesi al si neplektadi tiaĵon. Kaj la sonorilo jam sukcesis atingi tian rangon. Pluraj serĝentoj kaj senrangaj policianoj estis komisiitaj enketi pri la af-

ero. Ili longe kaj detale enketis, ja unuavice vizitis kaj konatiĝis kun la sonorilo, kiun ili (ankaŭ policistoj estas homoj) iom time, sed ensuĉante ajnan vorton pri timo, tuŝis kaj esploris. Ĝi, kiel atendite, riveliĝis plene normala, eĉ sen ia direkto, ia fendo aŭ io simila, kio povus okazigi moviĝon de ĝi ilo. Oni kompreneble hipotezis la eblon, ke la vento ĝin movis en tiu nokto, sed ĝi ne helpis pro la simpla fakto, ke tiaokaze ĉiuj sonoriloj en Roterdamo estus sonintaj. Ankaŭ la eldiro de nekonantoj de Roterdamo, ke la vento movis nur la plej altan sonorilon en la urbo, montris nur ilian nekonon de la afero, ĉar en Roterdamo estas multaj preĝejoj ĉiaaltaj, kaj multaj pli altaj ol Van Willem, same kiel pli malaltaj.

Oni esploris ĝin ankaŭ el scienca vidpunkto. Fakuloj estis vokataj por ekzameni ĝin, kaj ilia detala esplorado montris sole, ke la sonorilo ne havas ian ajn apartan econ: erodita, kompreneble, de la paso de la jarcentoj, de la pluvo, la neĝo kaj ĉiaj

meteoĵ, sed nenio eksterordinara, nek len-  
doj, nek malregulaĵoj,  
nek alispeca konsisto de  
la metaŭo (oni elprenis  
plurajn pecetojn kaj ilin  
analizis. Oni eltrovis,  
ke la sonorilo estas  
preskaŭ plene pure bron-  
za, sed oni malkovris unu  
pilan tute kuriozan at-  
eron, nome, ke eta, etega  
kvanto da arĝento estas  
miksita en ĝin. Tute  
ekscita afero por stu-  
dentuloj de la preĝejo kaj  
de la hispanaj riĉaĵoj,  
por ŝatantoj de enigmoj  
kaj por miremuloj, ĉar ja  
estas absolute nekredible  
kaj nekomprenible, kial  
tiu sonorilo enhavas iom  
da enmiksita arĝento. Sed  
tio ne helpis solvi la  
alian pli gravan enigmon,  
kial ĝi sonas, kiam ka-  
tastrofo estas alvenonta.

Pli tunda  
esplorado de tiu preskaŭ  
du metrojn alta kaj unu  
kaj duonan metrojn larĝa  
ĉe la rando sonorilo ne  
eblis, ĉar la  
aŭtoritatuloj ne per-  
mesis. Tiam malpermeson  
kaŭzis ne la pia kredo,  
ke la sonorilo estas  
demone sorĉita, kaj ke ŝo  
estas pli bone lasi ĝin  
pace ripozi, sed la kon-  
stato, ke la pli kaj pli  
disvastiĝanta ramo pri

ĝia sorĉo, demoneco, aŭ  
kiel ajn la ĵurnaloj ĝin  
dirinis, pli kaj pli ar-  
tiris homojn, emaju vidi  
per siaj propraj okuloj,  
eĉ se nur de la suba par-  
to (la suprenirado estis  
rigore malpermesata), la  
laman kaj misterpienan  
sonorilon. Tia fonto de  
enspezoj, pro la vizitado  
de la urbo iar tiom multe  
da homoj, ne estis  
neglektinda, kaj la  
roterdana urbestro  
certe ne neglektis ĝin.  
Estas ĝenerala kredo tam-  
men, ke pli tunda esploro  
ne malkaŝintus signifajn  
indicojn, unue, ĉar oni  
tre bone esploris ĝin,  
kiam ĝi pendis tie supre,  
due, ĉar por nenio servas  
esplori demone sorĉitan  
sonorilon, kiel ilustris  
aŭ kriis ĵurnaloj, urbes-  
traranoj, kredemaj homoj  
kaj infanoj. La kristana  
eklezio ne deziris ĉesigi  
la funkciadon de tiu  
preĝejo, kiu havis tiel  
ĝloran historion kaj plu-  
rajn valorajn artobjek-  
tojn, ĉar, se ĉion kon-  
sideri, nenio pruvis, ke  
tiu sonorilo havas ian  
faktan rilaton al la  
bedaŭrindaj okazintaĵoj.

La svarmanta in-  
tereso pri la sonorilo  
ĉesis iom post iom en la  
sekvaj jaroj, malpli da

homoj vizitadis Roter-  
daman, kaj baldaŭ alia  
demono tiris ĉies aten-  
ton: la demono de la mil-  
ito. Ne restis tempo por  
okupiĝi pri ŝajne  
sorĉitaj sonoriloj, kaj  
la intereso tute for-  
velkis antaŭ kaj ĉe la  
elektiva realo de la mil-  
itaj teruraĵoj.

Eĉ tio tamen for-  
pasis, ne sen postsekvoj,  
kaj la invadita, detruita  
kaj subigitita Nederlando  
komencis spiri, reakir-  
inte sian liberon, kaj  
rigardi sian grundon kaj  
siajn nekredablajn digojn  
kaj polderojn. La cin-  
drize forbombardita  
Roterdamo pene, tre pene  
eklaboris kaj toriĝis la  
ruinojn. Ne multaj  
konstruaĵoj restis  
starantaj, kompare kun la  
komencaj, kaj inter tiuj  
elstaris la preĝejo Van  
Willem, nur parte disba-  
tita, kun sia alta kam-  
panilo. Oni diris, ke la  
interkonsento kun la dia-  
blo savis ĝin, kaj aliaj  
diris, ke fakte la diablo  
mem venis avie en tiu ta-  
ĝo. Ne mankis blasiemaj  
sarkasnoj demandantaj,  
kial la sonorilo ne ek-  
sonis ĉe la komenco de la  
atako, kaj la respondo  
sin pafis same morda kaj  
akompanata de abomena

rigardo al la nigra pro-  
filo de la sonorilo:  
"Eble ĝi mutiĝis de la  
timo antaŭ la "Stukas"  
(1)".

Kulpigi kaj  
abomeni senkulpan sonori-  
lon ne helpis relevi la  
urbon kaj la tutan lan-  
don, kaj tion bone kon-  
sciis la nederlandanoj.  
Iom post iom  
elkonstruiĝis novaj dom-  
turoj, kreiĝis verdaj  
ĝardenoj, stariĝis  
diskrevigitaj digo kaj  
Nederlando reakiris, ne  
facile, sian brilan kaj  
optimisman vizaĝon al la  
maro, kaj ankaŭ al la  
tero.

La subitaj kaj  
tunebraj sonoj de la iam  
fama sonorilo estis jam  
nura memoro en la menso  
de la maljunuloj, kaj  
nura legendo en tiu de la  
junuloj hazarde trafintaj  
antikv-ĵurnalan informon.  
Unu plia el tiuj ian-  
tomeskaj historioj, kies  
solvo kuŝas en  
nepenetrebla obskuro. Se  
ne temis fakte pri ia  
tute brila trompo, de iu  
ial realigita. Sed tiaj  
pensoj formiĝis nur en la  
kapoj de la malmultegaj,  
kiuj havis ian interese-  
ton pri la preĝejo kaj  
ties historio.

La sonorilo tamen

ne ekmutis por ĉiam. La trian, kaj lastan, fojon, kiam ĝia bronza, preskaŭ lamenta voĉo ekfluĝis tra la friska nokta aero de Roterdamo, ĝi komence rikoltis ege malmultajn okulovregojn, orelistopojn kaj terurkriojn, ĉar ne multaj memoris aŭ konis ion pri ĝi. Sed tiaj novaĵoj ne longe restas ĉe unu persono, ĉi tiu telefonas al alia, tiu kuras rakonti al sia amiko, kaj tiu al sia fianĉino... antaŭ ol la lamentoj de la sonorilo tratis la urbolimojn, la tuta Roterdamo jam estis terurita kaj konsternita, sur la strato, kun siaj havaĵoj, en aŭtoj provantaj elhaki al si vojon tra la pelmela aŭtanaso fuĝanta el Roterdamo. La sonorilo sonis preskaŭ unu horon, ĝis policianoj, komisiite de iu ajn poliestro, supreniris kaj provis per marteleg-kaj hakilbatoj ĝin haltigi, sed ne sukcesis, ĉar ĝia freneza rapido kaj moviĝado estis teruraj. La vento ŝajne aliancis kun ĝi kaj malebligis ĝustan agadon. Sed ja ne ĝi estis la kaŭzo de la freneza danco de la sonorilo, ĉar ĉiuj roterdamaj preĝej-sonoriloj ne

pli ol moviĝetis pro ĝi. Finfine oni venigis armean bazukon, ŝargis ĝin kaj... paŭ!, kun terura ĝemo la sonorilo dekroĉiĝis de la noko, sin elane elfjetis tra unu el la muraj aperturoj, kaj malŝvebe falis kun tondrobruo apud la statuon de Erasmo, kiu staras antaŭ la preĝejo. Tie ĝi restis, kuŝanta, ĉirkaŭata de granda homamaso, kiu ekvenadis de ĉiuj flankoj, kaj de la plej granda abomeno, kiun imagi oni povus. Tiel mortis la sonorilo de Van Willems.

Ties morto tamen ne malhelpis en tiu nokto la piej grandan tonuabonuon, kiun Roterdamo suferis en sia historio, se ne enkalkuli la nazian bombadon. La teruritaj homoj, kiuj sin jektadis sur la straton, solaj aŭ kun sia familio, portantaj plej strangajn aĵojn, kiujn ili savi provis, laciĝis dum multaj horoj frenezuloj. Neiu plu konis amikojn, ĉiu pretis murdi por savi sin. Kaj efektive faris. Ĉirkaŭ kvarcent personoj mortis tiunokte, proksimume cent kvindek el ili murditaj, kiel poste riveliĝis el la polica enketo. Cen-

tojn kaj centojn da ŝteloj, seksatencoj, plej diversaj krimoj portis la sonorilo kaj ĝiaintera eksonado. Incendioj, nazardaj aŭ provokitaj de mensaj maisanuloj, intermitaj elektromankoj, la nokta mallumo, ĉio kontribuis krei la plej danĝeran kaj danteskan pelmejon, kiun koterdamo suferis de post la nazia atako. Iom post iom oni sukcesis ekregi la situacion. Policanoj, armeanoj kaj volontulaj helpantoj, tuj venigitaj kaj venintaj el aliaj urboj, povis ĉesigi la krimojn, estingi incendiojn, unuvorte, restarigi normalon. La pelmela aŭta ĥaoso de la homoj, kiuj provis eskapi, kaj por kiuj la veturilo fariĝis la ĉerko, eknoviĝis pli kviete, maisame ol la larmoj de la nekredemaj viktimoj... koterdamo, ne la unuan fojon, sukcesis elkreski el sia propra mizero, kaj pluvi. Ja ne la sonorilo, kontraŭ kiu la luta furiozo de la viktimoj de ĝia stulta blekado direktiĝis. Gi konservis sian originan formon apenaŭ kelkajn minutojn ĝis post la alveno sur la placon de tiuj, kiuj perdis aŭratajn perso-

nojn. Oni rakontas, ke unu virino eĉ perdente atakis ĝin. La tiaj okazoj la homa torto dekolliĝas, kaj povas eldestrui ajnon.

La sonorilo mortis, efektive, ne sen antaŭe, provokinte tian apokalipsan, torporti kun si anason da homoj. Oni ekcerbumis pri la kialo, el kiu la sonorilo, se kredi, ke ĝi vere estas sorĉita, eksonis. Ne okazis de ekstere veninta atako kiel unuaroje, nek la kataklismo kiel duaroje. Kaj ne estis tre trankviliga la penso, kaj ne multaj volis aperte kontesi al si, ke la katastrofo disbatinta koterdamon okazis ĝuste pro tio, ke la sonorilo eksonis, kaj ke eble... eble ĝuste tiun katastrofon ĝi diŝeroidis, tiun katastrofon, kiun ĝi mem provokis. Nescieble, kaj nesciate.


La senforma bronzo, kiu antaŭe konsistigis la sonorilon, estis ekposedata de la urbestro, kaj konata artisto ricevis la komision fari el ĝi statuon, kiu simbulu... nu, la tragedion. Tiu laboris super la verko dum du jaroj, kaj fine el liaj manoj eliĝis la

nun tre iana statuo de la homo, aŭ de la frano de homo, kiu levas la brakojn en terura gesto de doloro. Ne estas vizaĝo, ne estas koro, truo anstataŭas, kun antaŭenpuŝita brusto, ekkuronta kaj sentiganta siajn blekojn de... ne eblas priskribi, de kio. La statuo farita el la bronzo, kaj ankaŭ el la intima kvanto da arĝento, kiuj unue konsistigis la sonorilon, estas omaĝo de Roterdano al si mem, avertilo kaj pri tiu nokto, kiun la sonorilo per sia apenaŭ kredebla sono elkovis, kaj pri la nazia atako al Roterdano, de

kiu ĝi estas amara memorigilo, kaj kies barbarecon priskribas plaketo sur la statua piedestalo.

Pacas Roterdano, kaj pacas ankaŭ ĝiaj sonoriloj, jam de multaj jardekoj. Apenaŭ memorata estas hodiaŭ la historio de Van Willem; neniu ĝia frato povis imiti tian arĝentan voĉon.

(1) Fama tre rapida ĉasavio de la nazioj dum la Dua Mondmilito.



## Leĝo pri la baska lingvo en Navaro

Baskio de longe dispartenas al du ŝtatoj: Francio kaj Hispanio. En la unua (la "alia flanko"), Lapurdi, Bazena-barre kaj Zuberoa troviĝas en la Atlantik-Pirenea Departemento, kune kun parto de Bearn.

Ĉi-flanke, Araba, Bizkaia kaj Gipuzkoa kompletigas la Baskan Aŭtonoman Komunumon kaj, fine, Navaro (Nafarroa) en si mem formas alian Aŭtonoman Komunumon.

En la norda parto (Iparralde) ne ekzistas leĝaro pri la baska lingvo. Se temas pri tio, kio dependas de Vitorio, hispana kaj baska lingvoj estas oficialaj samnivele. Sed okazas tre kurioza afero en Navaro. Tie ne estis leĝaro ĝis la fino de la jaro 1986. Laŭ la aprobita projekto, ĉi tiu malnova regno dividiĝas en tri zonojn:

- basklingva
- miksita (dulingva)
- hispanlingva

Post ol alveni ĉi tien, estas necese provizi kelkajn scierojn

En 1975 Navaro havis 483 867 enloĝantojn, el kiuj 53 340 estis basklingvanoj, t.e. 11%. (Datumoj prenitaj el la libro Lingva konflikto en Basklando, la plej fidebla studo rilate al ciferoj kaj nombroj)

Kaj jen la mapo farita en la leĝo:


- basklingva zono
- ▨ miksita zono
- hispanlingva zono

En la "basklingva" zono, baska kaj hispana estas oficialaj samnivele.

En la miksita zono "la civitanoj rajtas uzi ĉu la baskan ĉu la hispanan en siaj rilatoj kun la Publika Administrantaro"; kaj por la hispanlingva zono (kie, kompreneble, ankaŭ loĝas basklingvanoj) "la civitanoj rajtas uzi baskan lingvon en siaj rilatoj kun la Publika Administrantaro, sed tiu ĉi (la P.A.) povos postuli de la interesatoj la koncernan tradukon".

Rilate al instruado, la leĝaro estas tute ne klara. Oni nur garantias instruadon de (ne en) baska lingvo en la basklingva zono, kie, se iu volas, eblas peti instruadon en baska lingvo.

En la aliaj du zonoj la alveno de instruado de baska lingvo efektiviĝos iom post iom, sed oni ne specifas tempolimojn nek kriteriojn.



El la tri menciitaj, la miksa zono estas la plej grava laŭ demografiaj preskaŭ du trionoj de la tuta loĝantaro vivas en tiu zono. Sendube, diavoliĝo de la leĝaro en tiu "miksilajo" ludas grandegan rolon por la estonteco de la tiel nomata "lingua navarrorum".

Ĉi tia estas la sorto, kiu atendas la baskan lingvon en Navaro. La ĉeno, daŭrinta dum jarcentoj, rompiĝas; kaj tiu ĉi bedaŭrinda leĝo povas esti la lasta bato por la lingvo baska en ĝia kara Navaro.

Krome, ni devas toleri tiajn ĉi frazojn:

"Tiu ĉi leĝo celas impulsi reakiron kaj diavoliĝon de la baska lingvo en Navaro" (ENKONDUKA CAPITRO).

En junio 1987 okazis elektoj. Nu, en la miksa kaj en la hispanlingva zonoj oni rajtis voĉdoni nur kastilie. Se iu voĉdonus baskingve, oni konsiderus la baloton nevalida. Jen estas la unua paŝo por soleni la "glorecan" kvinan centjarigon...

CAGRENACE, ĈU NE ?

NAVARIDO





## Esperantigo de vaskaj loknomoj

Vaskaj loknomoj ofte estas duoblej; apud vaska nomo ni povas renkonti latinidan version, jen francoan, jen hispanan. Pro praktikaj kialoj (ekzemple, por rekonii loknomon dum vojaĝo) mi trovas konvena esperantigi almenaŭ la vaskajn formojn. Jam ekzistas sufiĉe tradiciaj formoj kaj principoj de esperantigo de latinidaj loknomoj. La samon ne eblas aserti pri vaskaj nomoj. Jen propono por kelkaj pli gravaj nomoj:

<u>vaske</u>	<u>esperante</u>	<u>vaske</u>	<u>esperante</u>
Araba	Arabo, <u>Alavo</u>	Gasteiz	<u>Gasteizo</u> , Vitorio
Biskaia	<u>Biskaĵo</u> , Viskaĵo	Bilbo	<u>Bilb(a)o</u>
Gipuskoa	<u>Gipusk(o)o</u>	Donosti(a)	<u>Donost(i)o</u>
Nafarroa	} <u>Navaro</u>	Iruinea	<u>Iru(j)njo</u> , Pampluno
Naparroa		Lapurdi	<u>Lapurd(i)o</u>
Euskadi	<u>Eŭsk(ar)io</u> , Vaskio	Baxenabar(re)	Baĝenabar(e)o,
Iparralda	} <u>Iparald(e)o</u> , (La) Norda Parto	Behenaparroa	<u>Bas(a)Navaro</u>
		Zuberoa	<u>Zuber(o)o</u>

"Z" estas normala esperanta "a", dum vaska "s" estas langovinta varianta (tamen aparta fonemo). Tial mi esperantigas vaskan "z" per "a", se la prononco tial fariĝas pli glata (ekzemple, antaŭ senvoĉa konsonanto); aliokaze mi uzas la skriban vaskan "z" kiel "z" pro principo de rekoneblo. Same, mi uzas la de mi konatajn, jam ekzistantajn formojn, kaj aldonas novan nur kiam ĝi forte diverĝas de la propre vaska. Tamen listiĝas eblaj variantoj, kiujn longa, ĝenerala uzado kribru. Precipe, mi preferas la formojn: Alavo, Biskaĵo, Gipusko, Gasteizo, Bilbo, Donosto, Irunjo, Lapurdo, Basnavaro, Zubero, Eŭskario, Iparaldo (ĉiuj subtrekitaj en la listo). "La norda parto" estas traduko, ne esperantigo de (preskaŭ) nomo. Eventuale, "eŭsko" povus signifi "vasko".


Pri "vasko"/"basko": Ambaŭ formoj estas fremdaj. Ambaŭ havas plian signifon en Esperanto. Ĉi-signifa "vasko" sidas sur P.I.V., kun la ĝenta signifo; tial mi ĝin uzis. Nur eblan etimologian pra-

vigon mi trovas: Se ĉi devenas de sama radiko kiel la vaska vorto "eusko", verŝajne troviĝis en ĉi (en la radiko) sono "ŭ". Ĝi, ŝajnas ke, ofte, prasono de "v" estas ĝuste "ŭ". Ankaŭ atentu, ke la grafika aspekto de "v" estas pli simila ol tiu de "b" al "u". Mi imagas, ke tia (ne nepre tiu) argumento ludis gravan rolon ĉe la kompilintoj de P.I.V. ankaŭ por elekti aliajn nomojn, ekzemple "Kordovo", hispane "Córdoba", arabe "Kurtuba(tun)", sed france "Cordoue". Simile, "vasko" troviĝas inter franco "basque", hispana "vasco" kaj vaska "eusko". "v" proksimas al "b" pro sono kaj al "u" pro formo.

Supozeble superfluas pravigi teorie la formon "Alavo", laŭ la hispana "álava" ansitataŭ la propre vaska "Araba", kiu povus naski miskomprenojn kiel "arabaj dialektoj de la vaska lingvo".

Tamen, kiel jam aludite, uzado estu la decida instanco. Miaflanko, dum ekzistas plena interkompreno (sed ĉu iam eblas?), ne gravas la svarmado de same signifaj formoj; krom se nia lingva idealo proksimiĝi al "Novparolo" de "1984".

Rikardo-Filipo Albert Rejna



## Marso: preter la biologia elreviĝo

La dudekan de julio 1976: ĉe la kontrocentro de la projekto Viking, ondaro da apliaŭtoj iestas la unuan surterigon de homa kreitaĵo sur la marsa supraĵo. Ĝio estis la komenco de esploro, kiu finis la esperon pri ekzisto de vivo sur la ruĝa planedo.

Marso estas, ĉiusence, la plej ŝanĝiĝema mondo. Tra la historio de la studo pri ĝi, Marso estis de dia simbolo ĝis laboratorio por la moderna scienco, objekto por spekulativaĉdo, literaturo kaj eĉ legendo. La relativaj movoj de la tero kaj Marso igas tre ŝanĝiĝi la brilon kaj ŝajnan diametron de ĉi tiu astro. Sur ĝia oranĝkolora disko oni rimarkas senĉesajn ŝanĝiĝojn long- kaj mallongperiodajn.

Marso estas la sola planedo, kiu montras evidentajn makulojn sur sia solida surfaco, teleskope rigardata. Ĝia modera distanco de la Suno; ĝia supraĵa ŝajno;

serio da kuriozaj koincidoj kun nia planedo, ekz. havi 24-horan tagon kaj 2-jaran jaron (1), akson je 24 gradoj kliniĝantan, polusajn kalotojn, akvon kaj, supozeble, oksigenon en sia atmosfero... Aro da konitaĵoj, kiu igis Marson esti la plej certa kandidato je vivnava planedo en la Suna Sistemo, post la tero, kompreneble.

La scienca historio de la planedo Marso komenciĝis en la dua jarcento. La observoj pri tiu astro faritaj de la plej grava astronomo, kiu laboris sen optika vidneĵo, iĉeno brane, je la fino de tiu jarcento, permesis, ke kepler, en la komenco de la sekvinta, deduktis la unuan el siaj tri lamaj leĝoj. Ĉirkaŭ tiuj datoj, Galileo celumis siajn praajn lornojn al ĉiu konita planedo. La direktoj kaj la nesufiĉa potenco de liaj instrumentoj marelis ĉi tiu observi pli ol diskon, "kiu ne estas perfekte ronda". La rezultoj atingitaj de

aliaj sautempuloj ne estis pli spektaklaj.

Deze de la 17a jarcento, dank al plibonigoj de la astronomia tekniko, hujzens kaj, precipe, Cassini, rimarkis unuafoje veraj makulojn sur la marsa surfaco. Iian komencis oni la diskutojn pri la rotacia periodo de la astro.

Sed la aŭtentika marsa polemiko ankoraŭ estis alvenonta.

Pasis multa tempo inter la rimarko de la unua makulo sur Marso en la 17a jarcento kaj la desegnado de la unua sistema mapo pri la planedo en la 19a jarcento. Unu el la astronomoj, kiuj plej kontribuis tiun celon, estis Giovanni Schiaparelli, ĵuste la sciencisto, kiu en la jaro 1877 komencis la ĝrandan diskuton: li komunikis, ke, dum la marsa tiujara opozicio, li observis subtilajn rektajn liniojn sur Marso, kiuj kunligis unujn makulojn kun aliaj, rekte interkoniĝante. Iuj, serio da observantoj, tiam profesuloj kiel dietantoj, per la plej diversaj instrumentoj, kontraris tiun observon.

La "kanaloj", kiel oni tiujn liniojn nomis, ne antaŭjuĝante ilian veran naturon, komencis ricevi proprajn nomojn, kaj ilin oni desegnis sur malsimplaj landkartoj. Kaj ekde la jaro 1893 aliĝis al la studo pri Marso tiu, kiu gvidis la polemikon ĝis ĝia plej alta punkto: Percival Lowell, kiu proponis, ke Marso estas mezdezerta, sed loĝata mondo. Laŭ Lowell, la kanaloj estis la lasta provo por transvivi de teknologie altranga raso. Ili funkcio estis transporti la malabundan akvon de la polusaj kalotoj al la soifantaj ekvatoraj regionoj.

Dume, aliaj observantoj, ĉe kelkaj el la plej science alt-nivelaj astronomio-centraloj, komunikis, ke ili ne trovis eĉ spuron de la kanaloj.

Josep Comas i Solà, markovrinto de kelkaj kometoj kaj asteroidoj kaj de la atmosfero de Titano, estis la unua, kiu proponis, en 1901, la veran naturon de la kanaloj. Li pensis, ke ili estas simplaj linioj da topografiaj relieferoj, mise observataj. Vere, oni povis plu-

vi, ke la cerbo emas geometriigi la misajn observojn de malgrandaj detaloj, vidataj je iom da distanco.

Dun la polemiko pri la kanaloj daŭris ĝis antaŭ ne multaj jaroj, la ebla ekzisto de vivo sur Marso iariĝis objekto de la sciencista kaj populara intereso en la tuta mondo.

Oni proponis, ke la malhelaj marsaj regionoj povus esti vegetaĵaro. Vere, tiuj zonoj ŝanĝiĝas laŭ la marsaj zonoj kaj tra la jardekoj, kiel evoluanta viva vegeta kovraĵo. La atmosferaj analizoj ŝajnis detekti iom da oksigeno, kaj la polusaj kalotoj estis pruvo pri la ekzisto de akvo. Iuj pensis, ke la malhelaj regionoj estis, almenaŭ parte, aŭtentikaj marĉoj aŭ lagoj. Fakte, antaŭ ne multa tempo oni ankoraŭ nomis kontinentoj kaj maroj la helajn kaj malhelajn marsajn zonojn.

La populara literaturo kreis la plej strangajn kaj familiarajn loĝantojn por Marso. Ankoraŭ hodiaŭ, por multaj personoj, marsano esta sinonimo de eksterterano.

Ke ikaj moderaj sciencistoj proponis hipotezon por la sezonaj ŝanĝiĝoj de la marsa surtaco: ili simple konsideris, ke periodaj ventoj movas malhelan pulvoron sur la suba plihela tereno. La spektroskopaj analizoj sugestis la pravecon de ĉi tiu hipotezo. Sed la definitiva spektroskopia konfirmo pri la konsisto tiei de la malhelaj regionoj kiel de la atmosfero, devis atendi, ĉar de la lero la precizon maligas la influo de nia aero. Kiel en tiom da aliaj okazoj, estis decida la partopreno de la astronautika esploro.

De longe, sovetio aktive daŭrigas esploran programon sur venuso. Alie, sur Marso, la situacio estis tre malsama.

Post la malsukcesoj de la kosmosondiloj sovetia Mars-1 kaj usona Mariner-3, estis Mariner-4 la unua, en 1965, kiu superflugis la ruĝan planedon. Sekvis la Mariner-6 kaj 7 en 1969.

Ili ĉiuj estis preterpasaj sondiloj, kaj ili montris, ke Marso estas mondo pli luna, ol oni antaŭe pensis, aŭse kraterigita kaj en kiu

oni ne trovis eĉ ĝuton da  
ilua akvo. Martiner-7  
totis kelkajn el la zo-  
noj, kie Lowell vidis la  
kanalojn. Oni ilin ne  
trovis.

Sed tiu serio da  
sondiloj ŝajnis toti la  
malplej interesajn mar-  
sajn regionojn.

En 1971 estis  
ĵetataj la sondiloj  
Martiner 8 kaj 9, por,  
unuatoje, enorbiti ĉi  
ĉirkaŭante Marson.  
Martiner-8 ne foriris la  
teron. Tamen, Martiner-9  
plenumis pli ol sufiĉe la  
cerojn de ambaŭ sondiloj.  
Kiam la 13an de novembro  
Martiner-9 eniris la  
ĉirkaŭmarsan orbiton, la  
planedo estis kovrata per  
polvero pro tuta  
ŝtormo, kiu malebligis  
ian ajn observon pri la  
supraĵo. Tial, la tuta  
intereso centriĝis sur la  
fotografado de la sateli-  
toj, "Robos" kaj  
"Deimos", io, kio unue  
estis nur neĉela iako de  
la projekto.

tiu satelitoj  
estis malkovritaj en 1877  
kaj baldaŭ oni rimarkis,  
ke ili estas tre malgran-  
daj (22 kaj 12 km) kaj  
malhelaj. En 1940 oni  
publikigis la malkovron,  
ke "Robos", la plej  
interna satelito, suferas

procezon nomatan  
progresiva akcelo. Iu  
fenomeno konsistas el  
alproksimiĝo de la sateli-  
to al la planedo, kies  
kialo estas liko de orbi-  
ta energio. Laŭ la tria  
keplera leĝo, se satelito  
alproksimiĝas al planedo,  
do ĝi moviĝas pli rapide.  
"Robos", kiel la plinulo  
el la artefaritaj sateli-  
toj ĉirkaŭteraj,  
ĉirkaŭiras sian planedon  
en malpli da tempo ol la  
planedo mem rotacias.  
Preskaŭ ĉiuj niaj ar-  
tefaritaj satelitoj ankaŭ  
suferas progresivan  
akcelon, pro la bremsa  
efekto de la plej altaj  
kaj maldensaj atmosferaj  
tavoloj. La fina rezulto  
de la progresiva akcelo  
estas la ialo de la sa-  
telito sur la planedon.  
Oni kalkulis, ke "Robos"  
kolizios en 100 000 000  
da jaroj. Ne malnitaj  
personoj demandis sin, ĉu  
povus esti "Robos" (aŭ eĉ  
"Deimos") artefarita sa-  
telito, ĵetita praepoke  
de malaperinta marsa  
civilizacio.

La hipotezo estis  
kuraĝa. Ĉerte, tro  
kuraĝa. Tamen, la nervo-  
zon oni sentis ĉe la kon-  
trolcentro je la ricevo  
de la unua bildo pri  
"Robos" sendita de

Mariner-9. Konfirmante la plinuitan opinionon, kaj por eĉreviĝo de la kredantoj pri viva Marso, la foto ne montris artelaritan sateilton, sed grandan rokan blokon terponitoraan.

Laŭgrade kiel la pulvora ŝtormo mildiĝis, Mariner-9 povis ekfotografi la surfacon. La vero pri la kanaloj iĝis definitive evidenta: ili ne ekzistas. Oni ankau konfirmis la teorion de la pulvoro movita de la vento por la ŝanĝoj de la malhelaj regionoj.

La fotografaĵo de larĝaj zonoj montris surprizajn detalojn:

Ĉe la regiono marsis oni observis kvar vulkanegojn, unu el ili montas 6110 m, dudek kvar kilometrojn alta.

La valo marinis estas ekvatora kanjono kvin mil longa kaj cent kilometrojn larĝa. keto da antikvegaj kanjonoj kaj sekaj riverfluejoj (neniel simila al la lowellaj kanaloj) kovras grandajn zonojn sur Marso. Pruvoj pri la fakto, ke pratepe larĝaj marsaj regionoj estis inundataj per akvo. rostsignoj de tortegaj akvofluoj. Evidentoj pri la ekzisto de

subterena tavolo da akva glacio.

Prasintepoke, Marso estis mondo pli malseka kaj akceptebla.

La malhelaj zonoj ne estis vegetaĵaro. La kanaloj ne ekzistis. Iamen, pratepe Marso povus esti medio akcepteble bona por vivo. Ĉu ĉi tiu vere ekzistis iam? Ĉu povus parto de tiu vivo lei rezisti ĝis nia tempo, almenaŭ mikrorforme? La respondojn oni povis trovi nur mal-suprenirante kaj serĉante. ankoraŭ restis espero.

Sovetia kelkfoje intencis surteriĝi sur Marso. En 1971 Mars-2 kaj Mars-3 enorbitiĝis. Mars-3 ellasis surteriĝsondilon, kiu, en la pulvora ŝtormo, kiu en 1971 kovris la planedon, komencis la mal-supreniron. Sajnis, ke la surteriĝo sukcesis malgraŭ la kontraŭa meteorologia situacio: la sondilo ekdissendis panoraman vidaĵon. Sed post dudek sekundoj la dissendo haltis kaj neniam rekomenciĝis.

En 1973 estis sendataj la kosmosondiloj Mars 4 kaj 7: du orbitaj kaj du surteriĝaj.

Mars-4 ne enorbitiĝis. La surteriĝa sondilo Mars-6 deturniĝis, kaj Mars-7 malfunkciis ĵuste ĉe la kontakto kun la tereno. Post 1973, Sovetio ne resendis kosmosondilojn al la planedoj preter la tera orbito. Anstataŭis ĝin Usono.

Ce la marsa opozicio dum 1975 oni ĵetis la du sondilojn Viking. Ĉiu konsistis el du sekcioj: orbita kaj surteriĝa. La orbitaj sekcioj devis ĉirkaŭrondiri Marson, detale studante ĝiajn surtacon kaj satelitojn, kaj servi kiel kunliga anteno por la komunikado inter la fero kaj la surteriĝaj sekcioj. La surteriĝaj sekcioj estis ekipataj per meteologia kaj sismologia instrumentaro... kaj per biologia laboratorio por detekti la agon de la supozitaj mikrobformaj marsanoj.

De post la enorbitiĝo, la du Viking komencis urĝe serĉi taŭnajn lokojn por surteriĝi. La dudekan de julio 1976, la surteriĝa sekcio de Viking-1 lasis la orbiton kaj ekasupreniris. La trian de septembro sekvis Viking-2. La lokoj, sur

kiuj haltis la sondiloj, nomiĝas Crise (Ura lero) Ebena kaj Utopia Ebena.

La Viking kunportis tri malsanajn biologiajn eksperimentojn. La detala analizo de la rezultoj ebligas diri, ke, por ĉies etreviĝo, sur Marso estas neniam mikrobo. Marso estas morta.

La eksperimentoj Viking montris serion da kuriozaj ĉemiaj reakcioj de la marsa tereno. Ĉi tio, je la komenco, estis kialo de dusenceco. Ankoraŭ iuj defendas, ke vere la Viking-rezultoj pruvas la ekziston de mikroboj, kiel sir Fred Hoyle. Liaj strangaj teorioj pri kosmaj gripaj epidemioj kaj intergalaksiaj bakterioj iĝas nun dubi pri la seriozeco de liaj konkludoj.

Hodiaŭ la scienca komunumo estas unuanima: sur Marso ne estas organikaj materio.

La surteriĝ-punktoj estis tre ordinaraj lokoj. La sciencistoj respondecaj pri la misio plendis pro enuo. Sur Marso estas pli interesaj kaj pitoreskaj lokoj, sed tie la medio ĝenerale estas pli kontraŭa al la vivo.



Malgraŭ ĉio, ĉiuj subtenas la opinion, ke ankoraŭ restas eblico de pratorna ekzotika vivo sur Marso, sube aŭ ene de la rokoj, aŭ en pli strangaj lokoj. Ankoraŭ estas kiuj rifuzas forlasi la ĉipon ĝis la lasta momento.

Sed, preter la biologia elreviĝo, la sondiloj Viking, per sia studo pri la marsa medio dum tuta marsa jaro, estis la antaŭaĵo de nova rizo en la esploro de tiu astro.

La konstanta kaj progresiva sovetia spaca programo pri planeda esplorado denove rigardas Marson. La malvolviĝo de la spacaj sciencoj dum la lastaj jaroj, precipe post la plej ĵusaj okazintaĵoj, ŝajnas aŭguri, ke la unua standardo najlita de la homa mano sur Marso estos tiukolora, kiel la marsa tereno. Tamen, ĉio nin igas pensi, ke la unua homa vojaĝo al Marso ne okazos, eĉ se ĉio marŝos bone, antaŭ ol du jardekoj.

Antaŭe, granda laboro estos farenda: studo simila al tiu farita de aŭtomataj sondiloj ĉe la Luno por prepari la

Apollo-vojaĝojn, sed je multe pli granda skalo.

Oni jam faras la unuajn paŝojn: la projekto robos, en kiu kunlaboras, apud Sovetio, la Eŭropa Spaca Agentejo kaj, individue, Francio, Finnlando, Svedio kaj aliaj landoj, lanĉos en 1988 du aŭtomatajn sondilojn, mirinde ekipitajn, al la ĉirkaŭmarsa orbito, celante studi la planedon kaj ĝiajn satelitojn (speciale roboson) pli bone ol neniam antaŭe. La venonta marsa opozicio promesas esti granda okazantaĵo. Per la projekto robos, Sovetio retrovas la vojon al la eksteraj planedoj. Ni esperu, ke tio malvolviĝos tiel bone, kiel la lastaj sovetiaj sukcesoj je aliaj flankoj de astronautiko.

David Galadí Enríquez  
Astronomia Grupo de Kordova.  
Andaluzio, Hispanio.

(1) Ĉi tio ne estas paradokso: fakte, Marso ĉirkaŭvojaĝas la Sunon en 080,95 tagoj.

## Abundas turmento kaj tragiko

**Pandemonio; diversaj aŭtoroj.**  
80 p., 14,2 × 20,8 cm. Eld. A.F.U.,  
ap.3275, E-29080 Malaga. Prezo  
700 pts. (14 gld.) + sendkostoj.

Kvin junaj hispanoj, kelkaj el kiuj  
evidente talentaj, komencis per tiu  
ĉi libro kunan aventuron, kies celo  
estas provi siajn literaturajn fortojn  
kaj diskonigi siajn kapablojn.

Ili havas komunajn trajtojn: brile  
elposedas Esperanton, stakate ver-  
kas kaj estas fascinitaj de ekzista-  
daj (eĉ preterrealaj) demar doj.  
Mankas ĉe ili junulaj gajo kaj ŝue-  
mo: abundas turmento kaj tragiko.

La scienca parto de la verko ne  
estas ambicia, sed la literatura stre-  
bas al stila preciozeco. Supozeble  
venos la tempo, kiam la aŭoroj  
komprenos, ke proza eleganco  
ne konsistas nepre en uzado de ek-  
sperimentaj neologismoj kaj  
morfermoj.

Ni certe denove aŭdos pri ili kvi-  
nopo, en kies sino Maria José Que-  
sada montras apartan maturecon.

**Gian Carlo Fighiera**

**Heroldo de Esperanto**

**N-ro 13 (1784)**

## RECENZOJ



### ♯ **pandemonio**

18 verkoj de 6 junaj hispanaj aŭtoroj (Albert,  
Franco, Kamaĉo, Moleono, Quesada kaj Sancho), inter kiuj  
kvar rakontoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA.

En alloga grafika vesto, sub prizorgo de GCA. 80 p.  
21 cm. Mendu ĉe: Andaluza Esperanto-Unuiĝo,  
Apartado 3275, Málaga, Hispanio. Prezo: 15,00 gld.  
plus sendokostoj (minimume 3,00 gld.), pageblaj al la  
uea-konto hejs-p. Triona rabato ekde tri ekzempleroj!

Eldonis: Pandemonio

## Iberaj diabloj

Kvin aŭtorifoj (1) pli-malpli hispanaj "furiozas senbride kaj tumulte" en ĉi tiu "loĝejo de ĉiuj diabloj" (P1V). Pli-malpli, mi diras, ĉar kiagrade hispanas kastillilingvano, kiam li verkas verde? (Merde, eĉ ne verde: la rakontoj -sakva, la lingvaĵo- nigras poĉe -iom Piĉe- kaj ruĝas sanĝo, kiel la satanaska kovrilo mam.) En la literaturhistorio ĉiam revenas la panacea nocio de l' nacio, kiu koncepton la esp-a verkado, pro tio iom storila, (feliĉe?) malhavas. Kio do sin kaptas, ne entute, la hispaneco de franco, Sancho, Kamaĉo, Moleono kaj Quesada? Se malici, mi respondus, ke en la vortformo "Panespermito", en iberaca epentezo. Sed serioza, en esp-aj verkoj mi ĉiam aspiras retrovi almenaŭ la Maupassantaskan francecon de francoj ĉe Schwartz, se ne la masklitan hungarecon de la aŭtobiografia "Adolesko" far Vaha. Similan hispanaĵon mi povis saluti nur en "Ekster la kadro" de Kamaĉo (la "teŝtoradon"). Ĝistis li, kiu lerte miksis iom de movada medio en tiun saman rakonton kaj en "Antaŭtagmezo", konsciante, ke internacieco kiel unusola inspirilo kutime naskas sangomankan (diabla, en unu alinon jam dufoja gutis sango al tiu ĉi lika "Pandemonio"! "Marko Boldon" (2).

Hone do, mi ne insistu pri hispaneco. "Pandemonio" jam sufiĉe kruelas sen imiti "Familon de Pascual Duarte". Ni vidu profere, kiajn rakontmodalojn favoras transnacieco. Forma, kompreneble: "short story" kaj "short short story" (manko de tempo kaj persisto ĉe verkanto kaj leganto, financeblo ofte nur de maĝraj volumoj, kiel ekzempliĝas ankaŭ la svelta "Pan demonio"). Enhave: la ĉiakutiman "thriller" ("La enĉerkiĝito" de franco, "Ruĝa sangoban" kaj "Antaŭtagmezo" de Kamaĉo; Poe kaj la Horla de Maupassant hantas -kaj pro tio certe ne hontas- ankaŭ en "Malantaŭ la pordo" kaj "Hura!" de Moleono, en "Ensuĉo" de Quesada, la plej bona novelo en la kolekto) kaj rakontojn sen vera difinabla tempo kaj spaco ("La lasta vojaĝo de kara Vilĉjo" far franco, "Voko" aŭ "Pano buŝon ne serĉas" de Moleono). En ĉiuj ĉi rakontoj mankas nek lerta suspenso nek sparke ŝpruca stilo, sed mi dubas, ĉu iu el ili, en nacilingva traduko, novus eniri pli ol sciencfikcia magazino.

Sed mi ĝuis leganta! Ĉefe la stilon! Komencantoj, ne malaspirigu via jam la minaca Montriĝo de frazejoj far Rikardo F.A.R. (ĉu mi malkaŝu, ke "far" en la hungara signifas: "puĝo"?), nek la tempalempa bezono konsulti P1V-on. La demonioj sorĉe kredigas al mi, ke Espo havas sufiĉe da vortoj Por ni eĉ tre, ĉar, mjaŝte, mi ne ŝatas "ovri" kaj "deskripti?" En nekanta stilekzerco ("Pano buŝon ne serĉas") Moleono same jam troas per "Anreapericelo ovras ripate la buŝon". Sed mi memoras diron de Kamaĉo: nek Joyce nek Cortázar estis riproĉitaĵ pro sia lingva aventuremo - male, pri ĉapa stilo ĉiuj fakulas. Kaj refero je Kamaĉo, kiu tiel lerte transkaptigas iun sian historion, ke la leganto apenaŭ retrovas sin (krom Li ven Dek) en la netradukebliĝanta rakonto ("Mi"). Ĉe Moleono kaj Kamaĉo reviviĝas eĉ la ŝoke laŭZamenhofa, ĉe Grabowski (korekto, se miveraras!) jam uzita memstara "o" ("La ŝlosilo, male l' ne kutiman ĉe aliaj paroloj, dekstrumis..." - Kamaĉo). Moleono revivigantas en sia prozo adjektivan "inter-

opacoj-haŭn" (n. 65).

Ŝerĉo de Ean-lliteratura identeco sentablas en dispersaj a-  
ludoj. La ŝerĉoj (fakte, ĉu oni interpretu ĉi majusklaŭ "ŝ-  
pon" el la antaŭparolo kiel grupan memdifinon?) bone koonas  
la verdan tradicion. Molegno ŝovas en "Hura!" tavereno "Ver-  
da Kato" kaj romanan titolitan "Hura!", Kamaĉo ĉerpas el Di-  
ega traduko.

Resume, "Pandemonio" estas rekomendinda "kirja kaŭkilla"  
(3).

István Friti (Hungario)

- (1) -iĉ- = malo de -in-.
- (2) "Marko Poldo, privata detektivo" de Kamaĉo en "La mi-  
rinda libro", Barcelono, 1984, ald. Barcelona f-Centro.
- (3) En la fiino, "libro por ĉiuj".

Momentoj

Amaj:

Kurtaj.

Sen amo:

Nenuligeblaj

Nekompreneblaj

Neatingeblaj.

Neatingebla

Vi

Sola

Kontinua

Konstanta

Eterna.

Vi

Proksima-lontana

Vi

Chi tie-tie for

Vi

Chiam-neniam

Amanta-amata.

Vi

Nur vi

Ech ne

Ĉi.

Hedeas Minor

## Mi ne scias

Mi ne konas la devenon, nur ke tamen mi alvenas  
Antaŭ mi aperas vojo, kiun sekve mi surtretas  
Mi vojaĝas plue ade, ĉu mi volas aŭ ribelas  
Kiel venis? Kiel mi la vojon vidis?...


Mi ne scias


Ĉu mi jam ekzistas longe, aŭ ĉu estas novbakita  
Ĉu mi estas flulibera, ĉu kaptita, katenita  
Ĉu mi gvidas mian vivon, ĉu troviĝas mi ligita  
Mi deziras ke mi sciu, sed ja tamen... ...

Mi ne scias

Elarabigis Rikardo F.A.R.

El La rojoj de Ilijâ Abû Mâdi (1889-1957)





Rep. 1949

Liven Dek

... kaj nia mondo  
somniale dancas sur  
kresto de ondo.

Kvazaŭ pasporto,  
la kondiĉo de 1<sup>a</sup> naski<sup>3</sup>  
estas la morto.

Rundas la luno  
somniale tra 1<sup>a</sup> ĉiel<sup>o</sup>,  
kaj la laguno.

Dum nokto nigras,  
eksilentas la ĵangal<sup>o</sup>  
kaj morto tigras.

Tiktake hantas  
noktomeze la horlo<sup>3</sup>  
dum tempo lant<sup>as</sup>.

En la mateno  
raŭke kriĉas vekhorlo<sup>3</sup>  
kiel malbeno.

Miaŭas kato sur tegment<sup>o</sup>  
ĉe la ronda lumo luna;  
kun ŝire plora am-lament<sup>o</sup>  
miaŭas kato sur tegment<sup>o</sup>.  
Respondo petas post moment<sup>o</sup>  
lin al noktumado kuna.  
Miaŭas kato sur tegment<sup>o</sup>  
ĉe la ronda lumo luna.

Liven Dek

Hohlov, Nikolai (1891-1953). Ruso; ekonomiisto. Lernis Esperanton en 1905. Kontribuis al multaj gazetoj, kaj tradukis el la angla, rusa kaj serba lingvoj. Verkoj: *Krucumo* (traduko, 1922); *La morto de la delegito de UEA* (originala komedio, 1924); *Orientaj fabeloj* (traduko, 1928); *La morto de Danton* (tradukita dramo, 1928); *Historio de la mondlingvo* (traduko, 1928); *La tajdo* (originalaj poemoj, 1928). Kuntradukinto, kun Blaikie, de *Bela Joe* (1929) kaj tradukinto de *La unua soveta blumingo* (1932). Kunredaktoro de granda rusa-esperanta vortaro.

(lastpaĝaj versoj)



### La luna ebrio.

Jen — ĝi brilas, mia luno,  
Virgomaska amlucerno,  
Nuda mammo el latuno,  
Iritilo de l' eterno . . .

Jen — ĝi trenas, pala torĉo,  
Tra l' cipresoj ombran langon —  
Kaj la tero sub la sorĉo  
Paroksisme verŝas sangon.

Jen — ĝi paŝas, noktulino  
Plej alloga, rafinita —  
La komenco kaj kulmino  
De l' pasio senevita.

Jen — ĝi tiklas kaj sufokas,  
Estingante ĉiun honton,  
Jen — ĝi vokas, laŭte vokas:  
Serĉu, kaptu kunĝuonton!

Kaj subiĝas la animoj,  
Kaj triumfe batas koroj,  
Estas for la tagaj limoj,  
Kaj ne gardas la honoroj . . .

Vivajn korojn ligas pare  
La magia lunsonato  
Por oferi suraltare  
Al Eroso kaj Hekato.

Per la flamaj rozkoroj  
Juna virgo amburĝonas,  
Kaj anstataŭ la paroloj  
Longaj, longaj kisoj sonas . . .

Ah, — dronante en inspiro  
De la tenta nokta disko,  
Estas ĝoje — esti viro  
Kaj facile — odalisko . . .

n-ro 1  
(1988: 1)

# la mano

## redaktas

Jorge Camacho  
Georgo Kamaĉo

Chantada 43, 1-J  
E-28035 Madrid

## eldonas

HEJS  
Hispana Esperantista Junulara Societo  
Sociedad Juvenil Esperantista Española  
Sol, 75  
41003 - Sevilla

## enhavo

**kunredaktas** Rikardo F.A.R. kaj F.K. Moleono

LINIO DE "la mano". ALVOKO.....	2
El "Mastro de 1' ringoj" / J.R.R. Tolkien (J. Auld).....	3
Sentitola penso / José Valén (Antonio Valén).....	9
Esperantaj vortoj kaj hispanaj vortoj / A. Valén.....	10
Literatura Manifesto '97 / Iltisa skolo.....	12
LETEROJ / Mark Fettes.....	15
La sonorilo de Van Willem / F.K. Moleono.....	16
Leño pri la baska lingvo en Navaro / Navarido.....	23
Esperantigo de vaskaj loknomoj / Rikardo F.A.R.....	25
Marso: preter la biologia elreviĝo / David Galadí.....	27
RECENZOJ. Abundas turmento kaj tragiko / G.C. Fighiera.....	34
RECENZOJ. Iberaj diabloj / István Ertl.....	35
"Momentoj..." / Hedeas Minor.....	36
Mi ne scias / Īlijâ Abû Mâdî (Rikardo F.A.R.).....	37
"...kaj nia mondo...". "Miaŭas..." / Liven Dek.....	38
LASTPAĜAJ VERSOJ. La luna ebrio / Nikolai Hohlov.....	39

Por abonoj turnu vin al HEJS en Sevilo.

Pri enhavo de kunlaboraĵoj  
responzas aŭtoroj mem.